


KOSMOS

Revuo de Martinus-Instituto



Simbolo n-ro 19 kaj 23

N-ro 2, 2022

Esperanto

Enhavo

RESUMO DE KLARIGO PRI SIMBOLO 19 - TRA LA MALLUMO DE LA INICIĜO (INFERO AŬ RAGNAROKO).....	2
LA PLEJ SUPERA MILITESTRO.....	3
RESUMO DE KLARIGO PRI SIMBOLO 23	7
LA GARDANĜELOJ DE LA LUMO KAJ LA MALLUMO	8
LA TERGLOBO, VIVANTA ESTULO –	12
ESPERANTO EN UNIVERSITATOJ	17
KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF	18

Resumo de klarigo pri simbolo 19 - Tra la mallumo de la iniciĝo (infero aŭ Ragnaroko)

La simbolo simbolas la kulminon de la mallumo. Per kosmaj analizoj ni povas ekvideti la solvon de la mistero pri la mallumo kaj la tiel nomata “malbono”. La mallumo estas efektive dia stadio en la granda iniciĝo en la konscio de Dio, kiun ĉiuj homoj sur la tero travivu. Sen ĉi tiu stadio estus la kreado de Dio de la homo laŭ sia bildo absolute malebla. Tio okazas sole nur per tio, ke Dio igas sian filon, la eternan vivan estulon, sperti tiun totalan mallumon, por tiel igi lin geniulo de la scio pri “la malbono” kaj “la bono” en la vivo. La travivadon de “la malbono” kaŭzas manko de kosma scio kaj amo al la proksimulo. Kio gvidas en la kulmino de la mallumo tio estas la mortiga principo. Ĉi tiu principo konserviĝas per la travivado de malamikeco kaj la kredo je tio, ke troviĝas maljusteco. Kosme vidate neniu povas fari aŭ suferi maljuston.

Centraj detaloj en la simbolo:

La oranĝkoloraj kampoj plej malsupre, apartigitaj per flavaj kampoj, simbolas vicon da enkarniĝoj de la estulo.

La triangulo kaj la koro estas esprimo de la mio kaj la organismo de la estulo.

La larĝa oranĝkolora arko maldekstre simbolas revenantan sortoarkon, kiu estas efiko de malbona aŭ malluma ago, kiun la estulo faris al sia proksimulo.

La persono, la naturo aŭ la ilo, kiu aktivigas la revenantan malluman sortoarkon, estas perceptebla kiel malamiko aŭ maljusteco. Ĉi tio simboliĝas per la sabro maldekstre. Tiel longe la estulo ne komprenas, ke ĝi mem estas origino aŭ prakaŭzo al sia sorto, ĝi daŭrigas reagi mortige. Ĉi tio simboliĝas per la sabro dekstre kaj la oranĝkolora arko kiu iras supren kaj dekstren. Per tio aktivigas nova malluma sortoarko, kiu revenos al la homo mem.


La kranio simbolas la malvarman percepton de la materiismo, ke la morto estas totala neniigo de la viva estulo.

La fajromaro simbolas militon kaj mizeron.

La vulkano simbolas kataklismojn.

La radioaŭreolo malantaŭ la noktonigra mortoĉielo de la materiismo kaj la sendieco esprimas la lumon de la altaj spiritaj mondoj.

Rigardu la plenan simbolklarigon de Martinus en *La Eterna Mondbildo 2*.



La plej supera militestro de Martinus

1. La homoj vivas en maltrankvilo pri milito

Ni vivas en tempo, kiam la mondo estas en brulego. Du grandaj mondmilitoj furiozis surtere kaj la homoj daŭre vivas en timo por ke nova mondmilito ekflamu, kiu fariĝu ankoraŭ pli terura ol iu iam pli frue. Dum nia tempo ja ne estas kiel dum malnovaj tempoj, kiam la militoj nur tuŝis certajn popolojn kaj regionojn, dum aliloke sur la tero oni eble eĉ ne sciis pri iu milito. Niatempe la milito ne nur koncernas tiujn landojn kie ĝi direkte disvolviĝas, sed ĝiaj efikoj ampleksas la tutan teron. Ne estas strange ke la homoj timas, ŝajne al ili, ke la mondpaco estas utopio kaj oni ankaŭ fojon post fojo aŭdas ke ne povas esti ĝuste ke la homaro estas sub evoluo ĉar la homoj malboniĝas ĉiam pli. Oni malleviĝas al pesimisma rezono kaj esprimas tion per la vortoj: "Ĉiam estis milito kaj ĉiam estos milito". Lastatempe eble kun la aldono: "Ĝis la homoj eksplodigis sin mem kaj la tutan terglobon en pecojn".

2. El la kosma perspektivo la situacio de la homoj ne estas senespera

Tiaj esprimoj oni ja povus nomi mensostaton de "la tago de la lasta juĝo". Oni havas la senton ke la tero kaj la homoj estas juĝitaj al ekstermado. Sed kiu plenumigu la kondamnon? La homoj mem! Ĉu oni povas imagi ion pli malsaĝa? Kaj oni asertas ke oni batalas por krei pacon. Tio ja estas same kiel oni volus estingi brulŝtiparon per fajro. Tamen estas multaj homoj ĉirkaŭe en la mondo, kiuj povas vidi la tute malsaĝa en la nuna situacio de la homaro, kio kompare kun ŝipanaro, kiu inter si batalas kaj ekdetruas la ŝipon por uzi la pecojn kiel mortigilojn, kausos la pereon de la ŝipo kaj ili mem. Sed tiuj homoj kiuj povas vidi la malsaĝon en la mondsituacio kaj faras ilian plej bonan por kontraŭlabori la uzadon de atomarmiloj k.t.p., estas tiom malmultaj ke iliaj voĉoj dronas en la bruo de militpreparoj kaj la minaco je malvarma milito, tiel ke ĉio estas nur senespera kaj senseca, ĉu? La situacio povas aspekti tiel, kiam oni rigardas ĝin el loka perspektivo, kiel la pli multo de la terhomoj faras, sed estas efektive eble rigardi la situacion de la homaro el alia kaj pli granda perspektivo kaj rigardante el tia perspektivo la situacio ne estas tiel senespera. El kosma perspektivo oni certe povas diri ke la surtera homaro travivas "la lastajn tempojn", sed en alia kompreno ol la kutima kie oni tion komprenas kiel neniigo de la tero kaj la homaro. Certe temas pri "pereo", sed nek de la tero nek de la homaro, temas pri pereo de la milito mem - la lastaj tempoj por la uzado de la principo de mortigado.

3. La cirkulprincipo normale manifestiĝas en kvar stadioj

Ĉi tie en la nordo, kie ni spertas la plej kompletan disvolviĝon de la kvar sezonoj de la jarcirkulo, ni havas malnovan esprimon kiu diras: "La tagoj longiĝas, sed la vintro fortiĝas". Kiam ni envenas februaron kaj kelkfoje eĉ marton, ni povas sperti ke frostoj, glacio kaj neĝo prenas la superregadon ĉiam pli, eĉ se la lumo alvenas pli frue dum la matenoj kaj la mallumo pli malfrue vespere. Tiu

lumo vere ludas gravan rolon por ni ĉiuj, ĉu ne? Ni sopiras al ĝi kaj estas kiel ni pli facile povas akcepti la malvarmon, la neĝon kaj la glacieron, kiam lumiĝas pli. Oni rimarkas ke nova tempo proksimiĝas kaj la suno iom post iom ricevas tiom da potenco, ke la neĝo kaj la glacio degelas, kaj la signoj de printempo ekmontriĝas, rakontante pri tiu tempo estonta, kiam tute aliaj fortoj superregu en la naturo. Sed tiu cirkulo, kiun ni ĉi tie en la nordo povas sperti en sia tuta disvolviĝo kiel la sezonoj, estas nur unu el la manieroj, per kiuj la universala cirkulprincipo manifestiĝas. Ĉiuj nekalkuleblaj cirkuloj de la universo kutime sin disvolvigas tra kvar sezonoj, ĉar ili estas bazitaj sur la principo de kontrastoj. Tio estas, du stadioj, kie unu, aŭ la alia, el la kontrastoj estas la supera, kaj du stadioj, kiuj estas transiraj stadioj. Ĉu ne la vintro estas periodo, kiam la principo de mallumo kaj malvarmo kulminas kaj la printempo okazanta transira periodo al la somero, la kontrasto de la vintro? Tion ni spertis tiom multfoje ke fariĝis fakto por ni. Kaj tiel same la aŭtuno estas transira periodo, kiam la malvarmo kaj la mallumo grade pliiĝas por ke ree atingu la kulminacion dum la vintro, kun ĝia neĝo kaj glacio. Dum la tagnokta cirkulo ni spertas ekzakte la samajn kvar stadiojn en malpli granda plivastiĝo, kiujn ni nomas nokto, mateno, tagmezo kaj vespero. Ĉi tio la homoj tiel bone scias ke ili plene alkitimiĝis kaj tute ne tion pripensas. Ili ankaŭ ne pripensas ke la sama cirkulprincipo aperas en normala homvivo kun ĝiaj kvar stadioj: infaneco, juneco, matureco kaj maljuneco. La infaneco estas la nokto- aŭ vintrozono de la estulo kie ĉiuj fortoj, kiuj pli malfrue disvolviĝos, ankoraŭ estas dormantaj. Dum la juneco ĉiuj tiuj fortoj ĝermas estante la mateno aŭ la printempo de la homo, kaj en matura aĝo tiuj fortoj atingas sian plej grandan plivastiĝon. La homo tiam estas sur sia tagmeza alteco de la vivo aŭ en sia somera periodo. La grade pliiĝanta maljuneco kun la griziĝantaj haroj kaj la grade malpliiĝantaj fortoj estas la aŭtuno aŭ la vespero de la homa vivo. La morto estas la sunsubiro de la homo, sed ĝia suno leviĝu super novaj horizontoj al novaj ekzistadoj kaj reinkarniĝoj en ĝia senfina ekzistado aŭ evoluo, kaj ĉi tie ni revenas al nia deirpunkto, la malnovaj vortoj kiuj diras: ” La tagoj longiĝas, sed la vintro fortiĝas”.

4. La vojo al la lumo iras tra la mallumo

La evoluo de la teraj homoj estas okazanta tra milionoj da jaroj de enkarniĝoj en fizikan materion ekde mineralaj statoj tra vegetalaj, animalaj kaj primitivaj homaj statoj al tiu paŝo de evoluo, kiun ili nun reprezentas. Tia evoluo okazas interne de giganta cirkulregiono, kiu en miaj kosmaj analizoj estas nomata spiralcirkulo, kiu ankaŭ havas siajn kvar fazojn kiel ĉiuj aliaj cirkuloj. Ene de sia nuntempa spiralcirkulo la tera homaro troviĝas en la kosma sezono kiu estas karakterizata de ĵus menciitaj malnovaj vortoj: ” La tagoj longiĝas, sed la vintro fortiĝas”. Ni troviĝas en kosma vintrozono, sed malgraŭ tio atingis tiom longe antaŭen ke la lumo, kiu ĉi-okaze estas la spirita lumo en la signifo de scio pri la vivoleĝoj, fariĝis pli forta. Temas ĉi tie pri la terhoma inteligenteco kaj la komenciĝanta humanismo. Sed malgraŭ ke ”la tagoj longiĝas” ni ankoraŭ spertas ke ”la vintro fortiĝas” ĉar la vintra principo de mortigado disvolviĝas inter la homoj kiel neniam antaŭe. Nun ili ankaŭ povas utiligi sian inteligentecon en la servo de mortigado ĉar la inteligenteco estas neutrala energio, kiu uzeblas same bone en la servo de la viviga principo kiel en la mortiga principo. La pli grandaj scio kaj lerteco de la terhomoj estas, pro tio ke la scio kaj lerteco ankoraŭ ne estas sufiĉe grandaj por esti pure homecaj, transformigintaj ilin al transiraj estuloj inter la besta kaj homa regnoj. Kosme vidante oni povas diri ke ili estas ia speco de ”diablaj estuloj” en kiuj homaj formoj kaj rezono komenciĝis, sed veraj homoj ili ankoraŭ ne estas. Ili troviĝas en kosma nokto- aŭ vintrozono, tamen tiel proksime al la mateno aŭ la alproksimiĝanta printempo ke la lumo ekĝermas en ilia konscio. Ili komencas sopiri al pli da lumo en la signifo de pli granda scio kaj ili komencas sopiri al paco. Ili revas pri ”la unuigintaj ŝtatoj de la mondo”, pri ”unu mondo”, pri homa liberigo kaj la rajtoj ĉiu homo havas sen konsidero de nacio, kredo aŭ haŭtokoloro. Ili starigas lernejojn, universitatojn kaj laboratoriojn kaj penas doni aliron al tiuj por ĉiuj. Ili havas malsanulejojn, klinikojn, la Ruĝan Krucon kaj multajn specojn de prizorgado. Ĉio ĉi kaj multe pli de samspeco reprezentas ”la longiĝantajn tagojn”. Tamen oni samtempe produktas pli kaj pli da longpafantaj kaj ruinigantaj armiloj kaj minacas unu la alian kredante, ke paco estas kreota per montrado de potenco kaj per superi la kontraŭulon rilate al fabrikado de armiloj kaj elpensado de novaj detruantaj rimedoj. Kial ĉio ĉi okazas? Ĉar la vojo al la ”ĉielo” iras tra la ”infero”, kio signifas ke la vojo al la

lumo pasas tra la mallumo aŭ la vojo al la vivo tra la morto. Per la vorto "morto" mi ĉi tie celas la materiisman staton, en kiu la plejmulto de la civilizita homaro troviĝas. Post tiu "morto" venos tamen "reviviĝo", tio estas, disvolviĝo de pure homaj fortoj, homa printempo ekaperu, ĉar ĝi ekaperos en la konscio de ĉiuj unuopaj homoj, surbaze de la spertoj ili estas havintaj en la malluma zono, de kiu ili iom post iom satiĝas.

5. Pro la kontrastprincipo la terhomoj iom post iom satiĝos je milito

Rigardante en tiu ĉi perspektivo ĉiuj militoj do estis necesajo, necesan malbonon kelkaj diru; mi preferas nomi tion io malagrabla bono. Mi scias ke estas malfacile rigardi la militon tiamaniere, precipe por tiuj homoj, kiuj momente havas tion tute apude. Sed se ne miloj da homoj, eĉ milionoj, estis mortigataj aŭ kripligataj en pratempaj militoj, entute ne estus ia ajn opozicio kontraŭ la milito en la animo de la homoj hodiaŭ. Estas ja la samaj homoj, kiuj vivas hodiaŭ, kiuj travivis la militojn de malnovaj tempoj. Oni eble opiniu ke estas strange ke la homoj ne finis batali antaŭ longe ĉar estis sufiĉe da militoj, de kiuj ili povis lerni. Sed longa tempo estas postulata por konstrui veran talenton de paco en la konscio de la vivanta estulo. Unue venas la stadioj, kie ĝi pensas pri venĝo kaj repago. La estulo deziras fariĝi pli forta ol sia kontraŭulo kaj venki lin, kaj tiaj avidoj aŭ deziroj ne ekzistas kiuj ne estos kontentigataj en pli longa perspektivo. La samon deziras la kontraŭulo kompreneble, kaj tiel la milito aŭ tiu stato, ni povas nomi "inferon" aŭ "la regnon de la mortaj", ekzistus eterne, se ne ekzistus io, kio nomiĝas la principo de malsato kaj satiĝo. La kontrastprincipo estas profunde kunligita kun tiu ĉi principo de malsato kaj satiĝo, kaj tial la paco proksimiĝos ĉiam pli, samrilate kiel la teraj homoj satiĝas je la militoj kaj la efikoj de la militoj kaj komencas krei kelke da novaj kaŭzoj, kies sekvoj ne estos militoj.

6. Hodiaŭ la militoj estas rigardataj kiel maniero por krei pacon

Ĉi tie kelkiuj eble volus kontraŭdiri ke la militoj estas kreataj de "la influhavaj", de la potenculoj interne en, kaj la politika kaj la ekonomia mondoj, kiuj estas tiel proksime ligitaj unu al la alia. Ekzistas ankaŭ homoj, kiuj opinias ke se ne estis veninta iu Hitler neniam estus iu dua mondmilito. La mondhistorio ankaŭ estas unu longa rakonto pri militestroj kaj iliaj militoj, kaj pri la tute plena manko de respekto por homa vivo de tiuj militestroj. Kelkaj el tiuj militestroj eble havis nur sian propran potencon en la pensoj, aliaj havis naciajn, religiajn aŭ grandpotence politikajn planojn, en kiuj la milito estis rimedo por efektiviĝi la planojn, jen ludo pri venko aŭ malvenko. Kaj tiam la homoj estis nur tiu materialo, kiun la militestro devis uzi, kaj tial estis grave inokuli la justan spiriton de batalado en la unuopan soldaton, tiel ke li estis preta volonte morti por la reĝo kaj la patrolando sur "la kampo de honoro", kiel oni diras. Tamen nuntempe ne plu eblas uzi malnovajn kliŝojn ĉar la "homa materialo" estas alispeca. Nun la milito estas rigardata kiel "malpura laboro", kio necese devas esti farata por ke paco estu atingota. Ĉi tiu ŝanĝo de mensostato ankaŭ estas pruvo ke "la tagoj longiĝas". Kaj plia ekzemplo de ŝanĝata mensostato, ankaŭ okazanta, estas ke hodiaŭ troviĝas militrifuzantoj kaj junaj homoj, kiuj tuj kandidatiĝas por nemilitista servo kie ili povas fari helpantan laboron anstataŭ mortigi. Kaj iom post iom neniuj diktatoroj aŭ militestroj povu briditi tion, senkonsiderante kiom ajn provoj de propagando kaj sugestio.

7. Tra la tempoj la grandaj militestroj estis specialaj iloj de Dio, "la plej supera militestro"

Kiajn rolojn do ludis Hitler, Mussolini, Stalin, Churchill, Roosevelt kaj ĉiuj ŝtatestroj, reĝoj kaj militestroj de pasintaj tempoj en la evoluo de la tera homaro? Ili estis apartaj iloj por "la plej supera militestro", tio estas, por la eterna Dio, kiu gvidas la estulojn de ilia plej morta stato al ilia plej vivanta stato. Sen la militoj la dia mondplano ne povus disvolviĝi, kaj kompreneble ankaŭ ne sen tiuj apartaj iloj, kiuj la grandaj armeestroj tra la pasintaj tempoj estis. Tiuj armeestroj ja ankaŭ estas ordinaraj homoj, kiuj nur havis specialan sorton pro tiuj specialaj kapabloj kaj talentoj ili tra multaj enkarniĝoj evoluigis. Kompreneble ankaŭ tiuj armeestroj devas rikolti, kion ili semis, same kiel ĉiuj aliaj, ĝis ili satiĝis je la milito. Kaj tiam ili estos egale fortaj iloj en la servo de la viviga principo, kiel antaŭe ili estis en la servo de la mortiga principo. Ili fariĝos bonfaruloj de la homaro partoprenante en la konstruado de paca kulturo. Tio kompreneble estos fore en la estonteco, same

kiel printempo kaj somero estas estontecaj kiom longe ankoraŭ estas vintro. Tamen "la plej supera militestro" jam elmetis sian planon kaj tiu ne estas "batalplano", estas plano, kiu kondukas al la mondopaco kaj la unuiginta homaro.


8. La paco komenciĝas en la propra menso de la terhomo

Parto de tiu plano estas ke la homoj de propra libera volo elektu la pacon, kaj kreu la pacon deirante de la spertoj ili faris, kaj tion ili ne povus fari, se ili ne estus travivinta la signifon de, kaj gajni la venkon kaj suferi malvenkon. Kion ili semas pro la venko, ili rikoltu en la malvenko, kaj la spertoj de la malvenko alportu novan semon kaj novan rikolton. La komenco de la milito troviĝas en la menso de la homo mem, kaj la paco ankaŭ devas komenciĝi tie. Estas ĝuste, kiam temas pri la grandaj militoj, ke estas tiel malmulte kion la unuopa homo povas fari, rigardante nur la pure eksterajn rilatojn. La grandpolitika ludo estas efiko de kaŭzoj, kiuj en pasintaj tempoj komencis tiun ludon, kaj tio pluiras laŭ fiksitaj leĝoj. La libereco de la unuopa homo dependas de kiamaniere tiu reagas al la neeviteblaj okazaĵoj. En tio kuŝas la estonteco de la tuta homaro en ties propraj manoj. La plano de la homara estonteco troviĝas en la vortoj de la kristnaska evangelio: "Paco sur la tero kaj inter la homoj bonfartoj". Do, ĉu ni povas krei pacon meze en mondo de milito kaj malamo? Jes, tiun eblon havas ĉiu unuopa tera homo, kaj tiu ne restu sola ĉi tie. La plej supera militestro aŭ la eterna Dio regas super fortoj, kiuj superas tiujn de la homoj. Tial la homoj neniam eksplodigos la teron kaj ilin mem en pecojn. Estas limo por la atingodistanco de la homoj, kiam koncernas la disvolviĝon de fortoj detruaj. Kaj kvankam, laŭŝajne, ankaŭ estas limo, kiam koncernas disvolvi kaj protekti vivojn, ĉi tiu limo estas nur kreita de provizoraj, moralaj kaj intelektaj kapabloj de la homoj mem. Por la homo, kiu prilaboras sian propran evoluon al utilo por la tuteco, tiuj limoj estos transpasitaj iom post iom, kaj li aŭ ŝi fariĝos ilo por la eterna Dio en la kreado de paco kaj amo al proksimulo, surtere.

Prelego de Martinus en Martinus-Instituto dimanĉe la 7-an de januaro 1951, eo-M2620.

Prilaborita de Mogens Møller kaj akceptita de Martinus. Tradukita de dana Kosmos n-ro 5, 1992.

Publikigita la unuan fojon en Kontaktletero n-ro 6, 1960. Originala dana titolo: Den øverste feltherre. Tradukita de Ejnar Langkilde, prilaborita de Robert Smeds kaj Antonia Bernhard




Simbolo 23. La finevoluinta homo laŭ la bildo de Dio simila al li

Resumo de klarigo pri simbolo 23

La finevoluinta homo laŭ la bildo de Dio estas estulo, kiu pasis la tutan malluman zonon de la spiralciklo, tute supervenkis ĉi tiun zonon kaj nun estas perfekta luma estulo. Ĝia plej forta elradiado estas pura amo al la proksimulo, sendepende ĉu ĉi tiu proksimulo estas planto, besto aŭ homo, kaj tute sendepende ĉu ĉi tiu proksimulo estas amiko aŭ malamiko. Ĝi tiel estas en kontakto kun la baza tono de la universo, kiu estas ĉioamo. Ĝi povas suferi kaj doni sian vivon al aliaj. Centralaj detalaj en la simbolo:

- La trianguleto ĉe la korofiguro simbolas la vivan estulon.
- La korofiguro simbolas, ke la estulo havas perfektan amkapablon, kaj la du kunligitaj manoj en la korofiguro simbolas ĝian perfektan kapablon pardoni.
- La granda oranĝkolora arko estas eligita kaj nun revenanta malluma sortoarko de la estulo mem.
- La granda flava arko montras, ke la homo kun granda amikeco akceptas la malluman sortoarkon kaj tiel eligas luman sortoarkon. Ĉi tiu perfekta maniero akcepti sian malluman sorton, gvidas la estulon el la bestoregno kaj en la veran homregnon.
- La granda triangulo simbolas Dion, kaj la blanka radioaŭreolo ĉirkaŭ la triangulo simbolas la primaran konscion de Dio. La koloraj kampoj ekstreme ĉirkaŭ la radioaŭreolo simbolas la diversajn vivsferojn.
- La kvinpinta stelo en la radioaŭreolo simbolas la mondsavadon.
- La Kristosimila estulo en la triangulo simbolas la finevoluintan homon.
- Plej malsupre estas montrata vico de la enkarniĝoj de la estulo interligitaj de sortoarkoj, kiuj grade ŝanĝiĝas de mortiga al humana mentaleco.
- La apero de la terglobo el cedanta nubaro simbolas, ke la homaro de la terglobo evoluas antaŭen al vivo en ama regno, kie ĉiuj amas ĉiujn.

Rigardu la plenan simbolklarigon de Martinus en *La Eterna Mondbildo 2*.



La gardanĝeloj de la lumo kaj la mallumo de Martinus, parto 2 el 3

La artikolo estas daŭrigo de “Gardanĝeloj en la servo de la nacio” (n-ro 1-2022), kaj ĝi daŭrigos per tria artikolo “La regno de la difilo” en sekva n-ro 1-2023.

1. Direktantaj gardanĝeloj malantaŭ ĉiuj funkcioj

La spirito de la terglobo estas la primara gardanĝelo de la homaro, kaj ĉiuj inter si kontraŭaj fortoj, kio signifas la diversajn spiritajn direktojn, ĉu politikaj, ĉu religiaj, deiras de la talentokerno de la terglobo. Per talentokerno ni ĉi tie celas la regantajn fortocentrojn animitajn per la mioj de la vivaj estuloj, kiuj enkarniĝis en la spiritajn kaj fizikajn materiojn de la terglobo. Nur per tiaj fortocentroj direktitaj de vivantaj mioj, organismo povas daŭrigi sian ekziston. Ekzemple, ĉefa mio estas enkarniĝinta en la pulmoj, en la koro, en la cerbo, en la renoj, en la hepato kaj en la galo kaj malantaŭ ĉiuj glandaj funkcioj. Tiuj mioj siavice estas gardanĝeloj por miriadoj da mikroestuloj: ĉeloj, molekuloj, atomoj kaj elektronoj, kiuj ĉiuj laŭ sia speco estas regataj de ĉefmioj. Sekve la ĉeloj havas siajn respektivajn ĉefmiojn, kaj la atomoj kaj molekuloj siajn kaj tiel plu. La tuta organismo tiel estas organizita mondo, universo en miniaturo. Ĉiu fizika organo en organismo tiel estas loĝata mondo, en kio do vivas socio de estuloj subordigitaj kaj gvidataj de gardanĝelo aŭ reĝo. Se ni rigardas la ordinarajn fizikajn organojn en la fizika organismo: la koro, la cerbo, la pulmoj ktp., ili ĉiuj estas perfektaj mondoj. Ili jam antaŭ longe trovis la plej perfektan formon por sia fizika organizado. En la koro ne ekzistas dubo, ĉu ĝia manifestado de la sanga cirkulado devas esti tia aŭ alia. Nur unu maniero ekzistas, nome la plej perfekta. Ĉiu alia formo estus abnormala, neperfekta kaj sekve malsaniga manifestaĵo, kiu kreus malharmonion en la organisma bonfarto. La samo validas rilate al la pulmoj, la glandaj funkcioj ks. Ĉiuj fizikaj organoj en la fizikaj organismoj estas perfektaj kaj laboras tiel perfekte helpe de siaj gardanĝeloj, kaj la sub ili organizita socia ordo, ke la makro-mio, la posedanto de la organismo, ne bezonas dediĉi pensoforton por tiuj funkcioj, eĉ tute ne rimarkas, ke ĝi havas tiujn multajn diversajn organojn aŭ malgrandajn ŝtatojn aŭ naciojn kun siaj mikroskopaj loĝantoj.

2. La leĝo por la humana komuneco

Kiam la organoj tiel bone funkcias, la kaŭzo estas, ke inter tiuj regnoj jam antaŭ longe estiĝis la plena, komplete humana komuneco, komuneco kiu estas senrezerva frateco. La leĝo, ke ĉiu servu ĉiun, jam antaŭ longe fariĝis klarmensa tagkonscio, praktikita evidentaĵo. Ili ja scias, ke se ili ne plenumas tiun leĝon, ilia regno venus en konflikto kun ĉirkaŭaj regnoj, kio signifas la ceteraj organoj en la organismo, kio rezultus en malharmonio, malsano kaj perejo por la organismo. Ĉi tie la unuopa organo estas centelcente kunaganta por la plua ekzisto de la ŝtato aŭ la regno (la organo), same kiel la ŝtato reciproke garantias la bonstaton de la individuoj. Tia politiko ankoraŭ ne fariĝis universale disvastigita inter la individuoj de la nacioj aŭ etnoj sur la terglobo.

3. La perfektaj konscifunkcioj de la tero

Se ni rigardas fizikan organismon kiel la terglobo, ni do povas vidi, ke ĝi havas certajn regionojn, kie ankoraŭ estas milito kaj neperfekteco en ĝia interno kaj ekstero, same kiel ankaŭ estas regionoj, kie regas la plej bela perfekta ordo, harmonio kaj bonfarto. Tia organa funkcio kiel ĝia rotacio ĉirkaŭ sia propra akso okazas laŭ antaŭdestinita leĝo kun absoluta centelcenta precizeco, sen ke la terglobo devas pensi pri tiu flanko de sia naturo. El la perspektivo de la terglobo, la rotacio okazas tute aŭtomate, sed ĝi estas delegita al por tiu funkcio inicita gardanĝelo kaj ties mikroorganismoj. La samo validas rilate al la spiro kaj sangofluo de la terglobo, kio signifas la cikladon de la akvo, de vaporigo al aero kaj la densigo al pluvo denove, kaj la per tiu proceso subtenitaj vivkondiĉoj por animalaj estuloj. Ĝia digesto, el la perspektivo de la terglobo, ankaŭ okazas aŭtomate. Ĝia digesto kaj akcepto de fizika nutraĵo konsistas el ĝia asimilado en sian korpon de grandega kvanto de suna materio, alivorte, la kvanto de lumo kaj varmo, kiun ĝi ĉiun tagon ricevas de la suno. Tiu materio en kunligo kun ĝia sangocirkulado, per la aera kaj akva funkcioj, ja transformiĝas al animala kaj vegetala vivo. Tio estas la vera fizika nutraĵo de la terglobo. Kiel ni vidas, ĉi tie okazas la samaj vivfunkcioj kiel en ĉiu alia viva estulo. Eĉ dormon ĝi ricevas. Ĉie, kie estas mallumo, ĝiaj mikroestuloj ricevas kondiĉojn por ripozi. La homoj, la bestoj kaj la plantoj, kiuj ja estas la mikroestuloj kaj talentokerno de la terglobo, ja dormas dum la nokto aŭ en loko kie la lumo de la suno provizore ne estas. Rigardante ĉiujn ĝiajn fizikajn funkciojn kaj kreoprosesojn ni povas vidi, ke ili jam estas aŭtomataj, estas organizitaj tiel perfekte, ke la terglobo eĉ ne bezonas pensi pri tiuj funkcioj. Tiu parto de ĝia apero jam antaŭ longe estis plene perfektigita.

4. La krizo de la tero: diktaturo aŭ demokratio

Tamen ekzistas aliaj regionoj, kie la tero ankoraŭ ne finkreis la talentokernojn, kaj kie la funkcioj ankoraŭ ne atingis la plej altan gradon de “iniciĝo”, kio signifas la kompletan memstarecon, la kompletan suverenan liberecon, la totalan kapablon kaj scion por povi labori memstare favore al la terglobo sen ties kunagado. Ekzemplo de tia nepreta regiono en la organizo de la terglobo estas la regiono, en kiu la mikroestuloj konsistas el la terhomoj. Ĉi tie estas granda aktivado de kontraŭaj fortoj por kaj kontraŭ la humaneco aŭ la amo al la proksimulo. La perfekta kunlaboro, la perfekta komuneco inter la terhomoj do ankoraŭ ne estas atingita, nek inter la terhomaj individuoj reciproke nek inter la direktantaj gardanĝeloj de iliaj nacioj. Ĉar ne estas unueco inter la gardanĝeloj de la nacioj, etnoj aŭ popoloj, ankaŭ ne povas esti unueco inter la fizikaj estroj de la ŝtatoj, ĉar ili ja nur estas provizoraj reprezentantoj aŭ medioj de tiuj gardanĝeloj. La funkcioj de gardanĝeloj ja ne estas el fizika, sed el penseca naturo. La kontraŭaj ideologioj, kiuj nun manifestas sin, ja devenas de la terglobo. Ĝi estas en iaspeca krizo, en kiu ĝi devas difini sian sintenon favore al la unua aŭ dua el la du ideologioj, diktaturo respektive demokratio, ŝtata subpremo respektive ŝtata liberigo de la individuo aŭ ŝtata persekuto respektive ŝtata protekto de la plej alta mensa evoluo de la individuo. En tiu parto de la spirita regiono de la terglobo oni ne povas nei, ke la situacio momente estas iom ŝanceliĝema. La diversaj potenculoj estas animitaj aŭ okupitaj de la malantaŭe situantaj gardanĝeloj. Tial iliaj paroloj, prelegoj kaj aperoj povas okazi kun grandega forto kaj potenco. Tio validas same por la diktatoroj aŭ la potencmalsanaj batalantoj, kiel tio validas por la mondliberigantoj. La sola diferenco inter la mondliberigantoj kaj la potencmalsanaj, egoismaj diktatoroj aŭ rabistoj de libereco, estas ke la du specoj de individuoj havas diversajn iniciĝojn. La diktatoro estas inicita talentokerno de en la terglobo malnoviĝinta sistemo, kiu ne plu havas kondiĉojn por vivi, ĉar ĝi ne plu havas la plenan subtenon de la terglobo, ja, eĉ estas iugrade kontraŭbatata de tiu terglobo. Aliflanke, la mondliberiganto estas inicita talentokerno de sistemo, por kiu la terglobo nun estas matura kaj preta meti ĝin sur la tronon en sia konscio. Tial la ideologio de la mondliberiganto aŭ la sankta spirito ricevos ĉiujn eblajn kondiĉojn por venki, ĝi ja parte jam venkis. Nun nur restas por la terglobo forigi la ne plu utiligeblajn talentokernojn, kiuj pro tio estas mortantaj. Sed mortantaj talentokerno, kio ja estas la samo kiel mortantaj estuloj, ĉiam aktivigas ioman bataladon kontraŭ la morto. Batalado, kiu kelkfoje povas montri grandan fortodisvolvadon, fortodisvolvado kiun ni konas sub la nocio mortkonvulsioj. La du ideologioj en la

mondo estas do unu kreskanta kaj unu velkanta, unu kiu estas naskiĝanta kaj unu kiu estas mortanta. La unua donas naskiĝodolorojn dum la alia donas mortkonvulsiojn. Ne estas strange, ke saĝuloj aŭ kosme konsciaj estuloj de la pratempo per tiom granda kompetenteco kaj precizeco povis antaŭdiri la nunan mondregantan dipereon kaj la militon de ĉiuj kontraŭ ĉiuj, aŭ tion, kion ni ankaŭ esprimas kiel “infero”.

5. La lumo kaj la mallumo havas la saman originon

Estas tiu ĉi spirita stadio de la tero, kiu en la homoj kreis la konceptojn “malbonaj spiritoj” kaj “bonaj spiritoj”, kaj sekve ankaŭ la konceptojn “diablo” kaj “Dio”. Kiel ni ĉi tie vidis, tiuj du nomoj absolute ne sufiĉas por la reala vero. Unue, la mallumo en la spiritaj fortoj de la homaro havas la saman originon kiel la lumo. Tio nur estas rivelado de ĝenerala principo. Mortanta interesosfero anstataŭigita de nova kaj pli perfekta interesosfero. Ja estas la samo kio okazas en nia ĉiutaga vivo. Kiam ni kelkfoje spektis interesan filmon aŭ teatraĵon, tiu ne plu estas interesa. La samo ja validas rilate al bona ŝerco, kiel ajn bona, sed ĉiun fojon ni aŭdas ĝin, ĝi iĝas pli kaj pli neinteresa. Ni deziras spekti novajn filmojn kaj novajn teatraĵojn, ni deziras novajn travivaĵojn kaj deziras liberiĝi de la malnovaj. Sed tio ne signifas, ke la malnovaj estas diablaj aŭ malbonaj en absoluta senco. Ili ja daŭre estas interesaj por tiuj estuloj, por kiuj ili estas novaj. La situacio de la homaro do estas tiu, ke la terglobo nun estas travivanta novan, interesan konsciregionon aŭ spiritsferon kaj finanta malnovan finspertitan sferon, kiu iam estis tiel interesa, ke ĝi plenigis ĝian tutan konscion. Ke la estuloj, kiuj estas incitaj por esti talentokerno por tiu spirita direkto aŭ ideologio, ne povas trovi bonajn vivkondiĉojn sur la tero, tio estas komprenebla afero kaj ne io malbona. Tiuj ĉi estuloj devos naskiĝi sur alia planedo, se ili ne povas finsperti sian spiritan direkton sur ĉi tiu planedo. La origino, aŭ la primara talentokerno por tio absolute ne estas diablo aŭ malbona estulo, same kiel oni ne povas diri, ke leono aŭ tigro estas malbona estulo, ĉar ĝi mortigas aliajn bestojn. Ja provizore estas vivkondiĉo por ĉi tiuj bestoj, ke ili mortigu por vivi. Kaj tiu sama provizora vivkondiĉo ankaŭ validas por la talentokerno aŭ la gardanĝelo de la diktaturo, same kiel fariĝis vivkondiĉo por mallumaj mondliberigantoj. La diablo sekve ne estas iu nigra aŭ malhela Dio, same kiel la mondliberiganto ankaŭ absolute ne povas esti Dio. La reala vero pri la diablo estas, ke li estas gardanĝelo de la diktaturo aŭ la aŭtokratio, kaj la vero pri la mondliberiganto estas, ke li ne estas Dio, sed gardanĝelo aŭ talentokerno de la komuna potenco aŭ la demokratio. Ambaŭ estas talentokerno en la psiko de la terglobo.

6. La gardanĝelo de la lumo kaj mallumo en la psiko de la terglobo

Se ni nun rigardas nin mem kiel terhomojn el la sama perspektivo, evidentiĝas, ke ni ĝuste ricevis provizoran hejmlokon sur la terglobo kaj fariĝis mikroindividoj en ĝia organismo kaj konscio. Ni ja havas psikon, kiu estas plene kongrua kun tiu de la terglobo. Interne de la psiko de la neinicita terhomo tiuj du ideologioj ankaŭ ekzistas. Ni batalas kun niaj de la pratempo hereditaj talentokerno aŭ potencocentroj por la mallumo kaj la aŭtokratio, kaj ni ankaŭ batalas por la proprigo aŭ kreado de novaj potencocentroj, kiuj estos loĝataj de talentokerno por komuna potenco kaj komuna regado. Sed antaŭ ol ni plene povos transiri al la ideologio de la komuna potenco aŭ al la devizo de amo al la proksimulo, kie ĉiuj devas vivi por ĉiuj, ni devas esti finmanifestantaj ĉiujn niajn talentojn por nia ligiteco al la aŭtokratio aŭ diktaturo. Tiel longe kiel filmo aŭ teatraĵo estas interesa, oni volonte ĝin spektas kaj spertas. Pli frue la altiro al tia travivaĵo ja ne estas satigita aŭ kontentigita. Sed la tempo ne estas tiom malproksima, kiam la homoj plene satiĝos je la diktaturo kaj komprenos, ke nur la demokratio povos doni tiun veran kontentiĝon, je kiu ĉiuj homoj esperas kaj serĉas. Estas tiu kontentiĝo, tiu satiĝo, kiu estas esprimata kiel “la daŭra paco”. Daŭra paco signifas daŭran harmonion inter la estuloj, kio signifas la totalan regadon de la regiono fare de la nova talentokerno kaj la forigon de la malnova talentokerno el la organismo de la terglobo. Tio estas la plenumo de la biblia antaŭdiro ke la diablo estos ligita aŭ senpotencigita. Ni vidas, kiel la du talentokerno de la terhoma psiko troviĝas en batalo pri la regado sur la kruco de Golgota aŭ ĉirkaŭ la sufera rakonto de Jesuo. La ekzekutistoj de Jesuo, la plej superaj pastroj, la skribistoj kaj fariseoj estis mikroindividoj en la primara talentokerno de la aŭtokratio, dum Jesuo, liaj disĉiploj kaj adeptoj

estis mikroindividuoj en la primara talentokerno de la komuna potenco. Per la du talentokernoj, ĉio riveliĝas antaŭ ni – antaŭ ni staras la gardanĝeloj de la lumo kaj la mallumo en la psiko de la terglobo. Sed per la krucumado ni vidis, ke la mikroindividuoj de la luma gardanĝelo estis tiel fortaj, ke eĉ la morto ne povas disvastigi timon dum ilia ĉeesto. La komuna potenco aŭ la amo al la proksimulo estas la plej alta vivfaktoro por la incitaj mikroindividuoj aŭ mikrotalentokernoj en tiu gardanĝelo. Kontraŭe, la mikroindividuoj de la alia talentokerno timas morti. Ili kredas sin kapablaj forigi la timon pri la morto kaj malfeliĉaj sortoj per armiloj. Ili estas milfoje pli forte armitaj ol la plej sovaĝaj rabobestoj. Sed ni vidas, ke la novaj mikrotalentokernoj en la lumregiono de la tergloba konscio jam venkis la morton, la mallumon kaj la malamon. Per la vortoj: “Patro pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras” ili ne nur pardonas, sed ankaŭ montras ke ili komprenas la mikroindividuojn de la malluma gardanĝelo kaj per tio konfirmas la venkon de la lumo super la mallumo.

Originala dana titolo: “Lysets og mørkets skytsengle”. La artikolo estas laŭ manuskripto, kiun Martinus skribis kiel preparo al prelego en Martinus-Instituto la 10.04.1949. Danligva prilaboro estas farita de Ole Therkelsen kaj aprobita de la konsilio la 22.04.1997. La unuan fojon en dana Kosmos n-ro 2-1998. Bib. eo-M1482.

Traduko Ejnar Langkilde. Prilaborita de Henning Sato von Rosen, Hakan Lundberg kaj Jonas Dalmoose en 2010.



La Terglobo, vivanta estulo – de Ole Therkelsen, parto 3 el 3

15. La krizo de la terglobo: diktaturo aŭ demokratio

Same kiel la tera homo estas duone besto kaj duone homo, tiel ankaŭ la tergloba estulo estas ŝfinksa. La organoj de la homa organismo perfekte kunlaboras, sed la diversaj landoj aŭ popoloj de la tero ankoraŭ ne atingis tiun perfektan kunlaboron.

Ĝuste nun la tergloba spirito estas en fazo, kie du reciproke kontraŭdirektaj konsci-tendencoj interbatalas. Mankas konkordo inter la rasoj, la popoloj kaj la diversaj nacioj de la tero, kaj tiu malkonkordo kaŭziĝas de tio ke la tera mio estas en ia krizo, kie ĝi devas elekti unu aŭ la alian el la du ideologioj, diktaturon aŭ demokration, ŝtatan subpremon aŭ ŝtatan protekton de la unuopaj homoj.

La diversaj potenculoj estas animataj aŭ obsedataj de la subkuŝantaj egoismaj konsci-aspektoj de la tera mio, kaj tial iliaj paroladoj, prelegoj kaj memprezentadoj povas havi grandegan povon kaj fortecon. Ĉiuj prezidentoj kaj la grandaj gvidantoj de la mondo estas obsedataj de tiuj el la pensimpulsoj de la tera mio, kun kiuj ili mem en sia ĉiutaga vivo plej simpatias. Tiamaniere oni povas rekte sperti en la politiko kaj la socia vivo la pensojn de la terglobo.

Ankaŭ religiaj gvidantoj kaj mondliberigantoj ricevas grandegan apogon de la tera mio. La paradoksaĵo estas ke kaj Hitler kaj Jesuo ricevis grandegan apogon de la tera mio, sed ĉiu aparte el ĝiaj du kontraŭaj konsci-aspektoj. Dum la nuna evolu-fazo la diktatoro ne ricevas la plenan aprobon de la tera mio kaj eĉ povas esti iagrade kontraŭbatalata. La diktatura ideologio estas malleviĝanta aŭ formortanta. Kontraste la mondliberigantoj estas incitaj talentonukleoj de la ideologio de ĉioamo, kiu estas kreskanta. El la du ideologioj en la mondo do unu estas formortanta, dum la alia estas naskata. La mondo tial spertas lukton kiu esprimas la agonion de malnova kulturo kaj la naskodoloron de nova kulturo. (Kosmos n-ro 2/1998).

Kiam Barack Hussein Obama estis elektita prezidento, kaj nigrula familio en januaro 2009 ekloĝis en la Blanka Domo post la multaj jaroj kun nigraj sklavoĵoj en Usono, tio ankaŭ estis esprimiĝo de tio ke la tergloba estulo estis progresinta en sia evoluo koncerne toleremon kaj demokration. Obama tiutempe certe estis la plej bona perilo por la konsci-disvolvo de la tergloba estulo tiukampe.

16. La tria mondmilito

Spite ke la mondo jam vidis du mondmilitojn kaj aliajn grandajn militojn, la homoj daŭre armis sin por novaj militoj, oni ne preparas sin por pardonemo kaj tutmonda amikeco kaj egalrajteco. Oni daŭre preparas sin por ekspluati la aliajn tiom kiom eblas.

Dum la tempoj estis multaj profetadoj pri la lasta batalo en la formo de tio kion oni nomas alterne Ragnaroko, Tago de la lasta juĝo, la mondfino, la lastaj tempoj, Armagedono kaj la Apokalipso. Martinus opinias ke la mondfino ne estas unu tago, sed tuta epoko, kiu komenciĝis kun la unua mondmilito kaj finiĝos nur post kiam kelkaj pliaj ankoraŭ pli grandaj mondmilitoj trapasos la teron. Tiuj militoj necesas por ke la homoj akiru ĉiuj spertojn necesajn por ke ili elkore komplete distancigu sin de la milito kaj ties tuta esenco kaj fariĝu 100 %-aj pacifistoj kiel Jesuo, kiu preferis doni sian vivon ol preni la vivon de aliaj. Ĉiu homo surtere mem spertos la verecon de la Jesuaj vortoj: “Ĉiu kiu fordonos sian vivon por aliaj, ĝin posedos; sed ĉiu kiu provos savi sian propran vivon, ĝin perdos.”

Laŭ Martinus eble plu okazados militoj surtere dum la venontaj 500 jaroj. Sed post 100 jaroj la grandaj mondmilitoj estos finitaj, kaj poste la internaciaj malarmadaj intertraktadoj kondukos al malpermeso de milito. Estos malpermesite al la unuopa lando havi propran militistaron, estos nur unu milita povo, kaj ĝi estos ĉe la monda polico.

Tiu “ministerio pri milito” kiu antaŭ longe alinomiĝis al “ministerio pri defendo”, fine fariĝos “ministerio pri pardonado”.

Tiel milito estas la vojo al paco. Malsano estas la vojo al sano. Malfeliĉo estas la vojo al feliĉo.

Egoismo estas la vojo al amo. Ĉiuj multaj suferoj surteraj ne estas vanaj, ĉar ili donas al la homoj la spertojn kaj talentojn kiuj kondukas ilin antaŭen en ama evoluo. La tiel nomata malbono tiel estas malagrabla bono. Ĉiu dolora sperto donas al la homo la plej dian donacon kiun ĝi povas ricevi, nome humanecon kaj amon.

Koncerne la necesecon de sperto-akumulo per la estontaj mondaj militoj, Martinus analizis tiun problemon lige al la simbolo La karmo de la homaro. (LEM2 simbolo n-ro 25).

La evolu-vojon al la estonta mondregno kaj la kondiĉojn en ĝi Martinus analizis pli detale en la klarigo de la simbolo La venonta perfekta homregno. (LEM2 simbolo n-ro 26).

17. La dumezurila moralo de la nacioj

La homoj de la planedo vivas en pli-malpli konstanta milita stato, kaj kie ne estas milito, estas pli ĝuste dirite armistico ol vera paco. La inteligentece superaj kulturaj ŝtatoj, kiuj dominas aŭ regas la teron hodiaŭ, povas prezenti la mondhistorie plej grandan efektivigadon de milito kaj mortigado per la plej modernaj armiloj, misiloj kaj atombomboj. Laŭ Martinus la inteligento estas neŭtrala kapablo, uzebla jen serve al la humaneco kaj pli alta moralo, jen serve al la egoismo kaj la milito. La materialisma kulturhomo estas giganto en teknika kreado, sed preskaŭ analfabeto en moralo aŭ kosma scio, kiel Martinus tion esprimas. (La monda situacio kaj la bildo de Dio, libro 26D, ĉap. 8).

Oni povas miri ke eĉ homoj de la gvidaj kulturŝtatoj povas militadi kaj grandskale mortigadi homojn, dum ili cetere havas tre bonan inteligenton. Sed en la unuopaj landoj regas dumezurila moralo. Interne de la landlimoj murdo kaj mortigo estas malpermesitaj, kaj malobservoj estas punataj per longedaŭraj malliberigoj kaj plej ekstremokaze per mortkondamno. Sed aliflanke la junaj viroj devas soldatservi kaj lerni mortigadon, kaj plej ekstremokaze ili en milito devas kunkulpi pri persekutado kaj mortigado de multaj homoj.

Ĉu ne estas dumezurila moralo omaĝi kaj honori la plej bonajn soldatojn, kiuj mortigis plej multajn el la malamikoj de la lando, kaj samtempe puni kaj ekzekuti la homojn kiuj mortigis nur siajn proprajn privatajn malamikojn? – En la naciaj leĝoj ne troviĝas vera kaj konsekvenca moralo, valida en unu okazo same kiel en alia. Ĉu oni ne vidas ke vere necesas nova kaj firma monda moralo?



18. Skandinavio estas protektita kontraŭ estontaj militoj

En marto 1971 Martinus diris en parolado: “Estas vere ke estos pliaj militoj, sed tio ne bezonos tuŝi nin. La milito ja ne estas por tiuj kiuj laboras kontraŭ la milito. Tiujn kiuj ne volas militon kaj ne volas krei militon, la milito ja ne povas trafi. Ni certe estos trafoblaj de ordinaraj materiaj okazaĵoj kiel restriktaj kaj simile, sed la milito estos ne tre severa ĉi tie en nia ĉirkaŭaĵo aŭ en Skandinavio, mi povas diri. Ne tie la milito furiozos. Ie ja devas esti konservata la nova kulturo ĝis la homaro estos akceptema al ĝi, kaj ĝi estos pli disvastiĝinta.” (Kosmos n-ro 3/1996).

En 1973 en demanda leciono Martinus diris: “Militoj okazos, sed en Skandinavio ni ne bezonas timi. La militoj ne ĉesos ĝis la homoj estos militrifuzantoj. Ili jam estas multaj, sed ankaŭ multaj ankoraŭ ne volas aliĝi. Atendas nin du grandaj mondmilitoj. Mi opinias ke en 500 jaroj la militoj estos pasintaj, kaj tiam multaj landoj estos unuiĝintaj – en UN kaj simile. La landoj pli kaj

pli unuiĝas, kaj fine la mondo estos unu ŝtato. Ĝis tiam tute ne povos esti monda paco, kaj ĝis tiam ne povos esti la ĝusta administrado. Kiam la mondo estos unu ŝtato, estos unu lingvo, kaj tiam estos multe, multe pli facile, ĉar oni ne bezonos ĉiujn tiujn tradukojn. Multege da tempo estos gajnita kiam ĉiuj komprenos ĉiujn.” (Kosmos n-ro 8/2009).

En sia 87-jara naskiĝtago la 11-an de aŭgusto 1977 Martinus diris: “Nun do la mondo ricevis tiujn kondiĉojn, kaj restas nur tiu milita stato aŭ tago de la lasta juĝo, antaŭanoncita en la apokalipso de Johano kaj per aliaj vojoj. Sed ni fakte povas esti feliĉaj ke tre granda parto jam pasis. La tuta hitlerismo, la mondmilitoj kaj la militflamoj kiuj de tiam estas tuttere, parte konsumis ĝin, sed do restas io ankoraŭ. Ne okazos ĉi tie, okazos en alia parto de la mondo, en la pli sudaj landoj, ĉe Arabio kaj ĉirkaŭe. Sed milito kompreneble postlasos sian markon ĉie, kompreneble estos restriktaj kaj postefikaj ktp., tion oni ne povos tute eskapi. Sed ni do loĝas en la plej bona loko, loĝante en Skandinavio en la norda, la norda duonglobo. Tie estas la plej bona loko.” (Kosmos n-ro 7/2009).

Cetere koncerne la arabajn landojn, ankaŭ Billenstein skribas lige al la lasta periodo de militoj kaj peripetioj 2009-2034 pri Arabio: “La grandaj detruantoj de la lasta periodo ŝajnas esti princoj el Fezo kaj Feliĉa Arabio.” (La klarigo de la profetaĵoj de Nostradamus, paĝo 86).

En marto 1978 Martinus diris en parolado al siaj kunlaborantoj: “Ĉi tie en Skandinavio ni plej bone fartas. Ĝi estas la plej bona loko de la tero. Ĉi tie ni estas plej protektitaj, kaj ĉi tie alvenas la impulsoj de la kosmaj mondoj. Ĉi tie la kosma konscio estas revelaciita kaj devis esti revelaciita al la homoj. Ĉi tie troviĝas la homoj akceptemaj al ĝi, kaj iom post iom ĝi disiros al multe pli da homoj en la tuta mondo, kiam ĝi estos liberigita de la Providenco.” (Kosmos n-ro 3/2004).

La 11-an de aŭgusto 1979 Martinus diris: “Ĉi-tempe la homoj do estas en Ragnaroko, ankaŭ se estas paŭzoj sen milito. Ni loĝas en bonega loko. La skandinavoj kaj iliaj najbaroj loĝas en la plej bonaj lokoj de la mondo. Sed eĉ ĉi tie oni ne tute povos eviti la konsekvencojn de la milito. Ĝi venos, kaj ĝi internaciigos la mondon per komuna suvereneco. La mondo jam fariĝis tre internacia per la negoca mondo de la homoj, per importado kaj eksportado, kaj tio ankaŭ estas la intenco de Dio. Estas la plano de Dio ke ĝi fariĝu unu mondo. La homoj povos kontraŭbarakti, sed estos vane.” (Kosmos n-ro 7/2008).

19. La tero bilancas sin mem kaj sian moralan sintenon

Kiel povas esti ke la terglobo estulo havas du tiel kontraŭajn flankojn de sia konscio? – Nu, la planedo same kiel ĉiuj aliaj vivantaj estuloj estas metita antaŭ du kontrastoj: Kion ĝi scias kaj kion ĝi ne scias.

La terglobo en sia evoluo troviĝas samloke kiel la homo en la sia, tio estas ĉe la limo inter besto kaj homo, ĉe la limo inter egoismo kaj humanismo. Tie la konscion trafluas unuflanke pensoj bestaj kaj egoismaj kaj aliflanke pensoj humanaj kaj amaj.

La ekzisto de tiaj du kontraŭaj konsci-tendencoj en la mentalito de la tero estas kaŭzita de tio ke ĝi havas internan konflikton en sia pensomondo. Ĝi kolektas ĉion kio povas pledi por egoismo kaj diktaturo, kaj ĉion kio povas pledi por libereco, egaleco kaj amo. Kiam ondas tien-reen la monda politiko, tio estas esprimiĝo de tio ke rezonas tien-reen la terglobo. Ĉar la homo perceptas 100 jarojn kiel longan tempon, kaj la terglobo perceptas 100 jarojn kiel tempon mallongan, la temperamento kaj pensoj de la terglobo esprimiĝas en la diversaj kulturaj epokoj de la tero. La terglobo ĝuste nun troviĝas en tia krizo kiu ĉiam antaŭiras inicon. Kun la humanaj mondreligioj la terglobo komencis spiritan procezon, kiu estos finita kiam la terglobo estos akirinta kosman konscion. En la sfero de homoj tio estos sentata per tio ke la pliparto de la homaro tiam estos akirinta kosman konscion. (Kosmos n-ro 1/1998).

20. Kunlaboro kun la volo de la terglobo

Ĉio kion ni vidas en la naturo kaj la ĉirkaŭa mondo, plej profunde estas esprimoj de pensado. Tio kion ni spertas ĉirkaŭ ni, estas la pensoj kaj volo de la terglobo estulo. Martinus interalie informas ke la gravito estas esprimo de la volforto de la tero. (LB2 par. 378).

Se ni ne havus samspecan volforton, niaj mikroindividuoj povus salti el nia korpo, sed tiu volo delonge fariĝis aŭtomata funkcio, do ni ne estas konsciaj pri ĝi.

Laŭ Martinus la tuta universo estas trapenetrita de diversaj formoj de volo kaj pensado, kiuj kaŭzas ke la tuta universo kunteniĝas en galaksioj, sunsistemoj, planedoj, organismoj, ĉeloj, molekulaj kaj atomaj sistemoj ktp.

Per sia scio pri la naturaj leĝoj de evoluado, Martinus povis antaŭvidi ke la terglobo estulo post ĉ. 300 jaroj sukcesos akiri kosman konscion. La terglobo nome sentas fortan sopiron je harmonio en siaj organismo kaj konscio, kio kondukos al la establo de vera homregno sur tiu ĉi tero.

Same kiel la terglobo ankaŭ milionoj da homoj deziras kaj sopiras vivi vivon en amo kaj harmonio kun ĉiuj vivantaj estuloj. Ĉiu homo kiu agordas sian volforton kaj pensadon al altruismo, humaneco kaj logika pensado, tiamaniere kunlaboras kun la volo de la terglobo kaj kun la dia volo, kiu ankaŭ estas la fono de la vivo kaj evoluo de la terglobo.



21. La terglobo bezonas ne nur fizikan nutraĵon, sed ankaŭ nutraĵon spiritan

La terglobo estas estulo ne nur fizika, kiu bezonas fizikan nutraĵon, sed vivanta estulo kun pensoj kaj konscio, kiu bezonas ankaŭ sian spiritan nutraĵon. “Tiun spiritan nutraĵon ĝi ricevas el spirita kernosistemo en la centro aŭ interno de nia Lakta Vojo”. (Libro n-ro 14B, ĉap. 4).

Laŭ Martinus do la terglobo komunikadas kun pli alte evoluinta planedo en la centro de la Lakta Vojo. Tiu kosme konscia planedo, kun homaro da perfektaj aŭ finitaj homoj, eĉ donus al nia planedo instruadon pri spirita scienco, same kiel Martinus kun sia kosma konscio povas instrui la teran homon pri la kosma scienco. Tiuj tutteraj pensimpulsoj el la centro de la Lakta Vojo fluegas kiel kosmaj impulsoj sur la terglobon en la formo de la nova monda impulso. (Kosmos n-ro 8/2009).

En prelego eldonita sur sondisko Martinus klarigas ke kiam Kristo diras: “La Patro sendos la parakleton, la sanktan spiriton,” tio okazos per tio ke kosmaj radioj fluegos sur la teron el finita sunsistemo kun finitaj homoj laŭ la bildo de Dio. – La tero, kiu pro tio pleniĝos per tiu spirita forto, tiel mem estas en evoluo kie ĝi komencas fariĝi perfekta homa planedo laŭ la bildo de Dio. (La venenaj substancoj de la konscio, 30.06.1969).

Martinus skribas: “La sankta spirito hodiaŭ brilas kun renovigita forto sur la mondon. La dirita spirito ja ne estas persono, sed estas la lumanta kosma materio, kiu sola povas esti materialo por la kreado de tiuj pensoj en cerbo kaj konscio, kiuj estas la plej alta scio pri Dio, pri la naturo de la universo kaj la plej altaj leĝoj pri la vivo. Tiu materio hodiaŭ lumas en la formo de kosma energia ondo el la centro de nia Laktovoja sistemo rekte sur la Skandinaviajn landojn. Kaj ekzemple estas tiu kiu kondiĉas, ke mi povas manifesti la plej altan kosman scion. Mia konscio atingis stadion kie ĝi evoluis al la kapablo ricevi, travivi kaj reen manifesti la sanktan spiriton”. (Artikolaro 1, par. 9.4).

Tiel surfone de tiu impulso, Martinus ĉi tie en Nordio povis manifesti la plej altan kosman scion.

22. Kio estas la diferenco inter Steiner kaj Martinus?

Post iu prelego viro diris al Martinus: “Estas ja neniu diferenco inter tio kion vi diras kaj kion Steiner diras”. – “Tamen estas”, respondis Martinus, “Steiner okupiĝas nur pri la teraj homoj, mi ankaŭ pritraktas la aferon de la Lakta Vojo.” – “Nu jes, estas klare, vi ja ankaŭ estas laktisto”.

23. La kreo de nova monda moralo stimula de la interplaneda komunikado

Skandinavio kiel dirite ricevas impulsojn de alte evoluinta centro en la Lakta Vojo. Ekzistas nombro da alte evoluintaj planedoj kun homoj tute finevoluintaj kun kosma konscio. Sur tiuj planedoj la homoj vivas kune en paco, amo kaj harmonio, kaj ili tiel apartenas al tio kion Martinus nomas “la vera homregno”. Pere de radioj kaj ondoj la planedoj povas “interparoli” aŭ interŝanĝi konscion. Kiam la terglobo parolas kun aliaj planedoj, tiu komunikado multfoje povas reflektiĝi en la kulturoj, kiuj pasas sur la tero. La multaj pli-malpli grandaj kulturoj kiuj pasis sur la tero, respondas al pensoj en la konscio de la tero.

Laŭ Martinus la terglobo kiel dirite korespondadas kun alte evoluinta planeda sistemo, kiu havas kosman konscion. Per la Spirita Scienco de Martinus homoj povas ekhavi kosmajn informojn en sian konscion, kaj tio sama okazas kiam pli alta mondo sendas kosmajn impulsojn en la konscion de la terglobo. Tio efikas tre stimule al la surtera evoluo, rezultas kulturoj, scienco, inventoj kaj evoluo en la direkto al pli granda humaneco.


Dum la kerno de la malnova monda impulso estis “kredo”, la kerno de la nova monda impulso estas “scio”.

24. Kia vidas Martinus sian rolon rilate al la kosmaj fortoj de la nova monda impulso?

Laŭ Martinus mem la kosmaj analizoj en lia mondbildo reprezentas la kernon de tiu nova monda impulso, kiu nuntempe fluegas sur la teron. Tiu nova impulso estas progrese plilongigo de la du antaŭaj mondimpulsoj. La nova monda impulso, kia ĝi estas esprimita per lia verko, signas la evolucian direkton de la venontaj jarmiloj sur tiu ĉi planedo. La kompreno de tiu verko ebligas al la unuopaj homoj konscie kunlabori pri la enorma kosma vol-direktado, kiu en la formo de la nova monda impulso fundamentas la kreon de nova monda moralo kaj de nova monda kulturo. (La Intelektigita Kristanismo, Antaŭparolo).

La grandaj kulturaj kaj humanaj progresoj de la homaro, kaj la ter-evoluo ligita al ĝi, laŭ Martinus estas portata kaj stimolata de la diritaj makrokosmaj fortoj. La tero troviĝas en konscia makrokosma kreado, kiu danke al nova monda moralo kondukas al la stablo de nova monda kulturo, en kiu ĉiuj homoj iom post iom vivas kune en libereco, egaleco kaj amo.

Fino de artikolo - parto 3/3. Pli da informoj en la libro “Martinus kaj la nova monda moralo”, www.oletherkelsen.dk. Tradukis la tekston el la dana Jens Stengaard Larsen.



Esperanto en Universitatoj

La unua diplomiĝo de la Esperanto-fako de Zaozhuang-Universitato, Ĉinio D-ro Bak Giwan, Esperanto-profesoro de Zaozhuang-Universitato

Komenciĝis la fako de Esperanto en la aŭtuna semestro de la jaro 2018 en Zaozhuang-Universitato en la urbo Zaozhuang, Ĉinio. La fako estas 4-jara bakalaŭra programo, kaj ĉi-printempe finiĝis la unua periodo de la 4 jaroj. La studentoj diplomiĝis en la Esperanto-fako. Entute 25 gestudentoj sukcese finis sian lernadon kaj ricevis diplomon de literatura bakalaŭro kaj la lernofinan ateston de la fako. Mi gratulas ilin kiel unu el la profesoroj de la fako.

Ili lernis Esperanton de la komenco, ekde la aboco. Komence la ĉina profesoro Li Weilun gvidis ilin, kaj ekde la dua semestro mi kaj aliaj 2 fremdlandaj esperantistoj-profesoroj instruis ilin rekte en Esperanto, kune kun kelkaj ĉinaj esperantistoj-docentoj. Ili lernis ne nur Esperanton, kompreneble, sed ankaŭ diversajn bezonatajn lernobjektojn de la universitato kaj ankaŭ la anglan lingvon kaj ekonomikajn lecionojn. En ĉinaj universitatoj la studentoj ĝenerale finas ĉiujn lecionojn en la unua semestro de la 4-a jaro. Laŭ mia vido en mia universitato tamen ili finas ĉion en la dua semestro de la 3-a jaro. Mi do povas diri, ke la lernotempo por ili estas pli-malpli 3 jaroj. Ĉiokaze tiu tempo estas sufiĉa por la baza lerno de Esperanto, ne nur gramatiko, sed ankaŭ historio kaj literaturo. Kompreneble ne ĉiuj studentoj estas tiel entuziasmaj kaj diligentaj, kiel esperas la instruistoj kaj la gepatroj.

En la fina semestro ili devis fari disertacion por la diplomiĝo. Tio ja vere estas granda kaj tre malfacila tasko por ili. Ankaŭ por mi estis la unua fojo gvidi studentojn por la diplomiĝa disertacio pri Esperanto. Mi gvidis 5 gestudentojn por ĝi, ĉefe pri gramatiko de Esperanto. Iel tiel mi sukcesis gvidi ilin, kaj ili finis sian taskon fari disertacion en Esperanto. Mi ne povas diri, ke iliaj verkoj estas altnivelaj. Sed estas fakto, ke ili skribis kaj prezentis ĝin nur en Esperanto. En Ĉinio kaj verŝajne ankaŭ en la tuta Azio ĉi tiuj disertacioj estas la unuaj provoj en la historio de la Esperantomovado. Tio do estas ja epokofara kaj gratulinda!

El inter la 25 diplomitoj 6 gestudentoj iros al la universitato Adam Mickieviĉ en Pollando, kaj plu lernos en la magistriĝa kurso pri interlingvistiko, kaj 1 studentino eklaboris jam en la redakcio de EPĈ en Pekino. Mi tutkore gratulas kaj bondeziras al ili por iliaj brilaj per-Esperantaj estontecoj. Nun 23 gestudentoj studas en la fako, kaj ĉi-jare plu varbiĝis 25 novaj studentoj por la fako.



Lernofina atesto kun la mencio de la Esperanto-fako

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

Al s-ro P. en Saratov, Rusio, jaro 1890


[Originala Verkaro](#), [Artikoloj](#), [El „La Esperantisto“ 1889—1895](#), N-ro 19

Al s-ro P. en Saratov. (0.4.11-19)

Mi miras, ke mi jam longan tempon havas de Vi nenian leteron. En la lasta tempo mi ofte rimarkas, ke leteroj skribitaj de amikoj al mi aŭ de mi al amikoj perdiĝas en la vojo, kaj de tio ĉi venas neatenditaj malagrabloj. Ricevinte de mi nenian respondon je sia vasta letero, la korespondanto ofendiĝas aŭ timas, ke li estas maloportuna al mi per sia skribado, kaj tial li ĉesigas sian korespondadon. Sed se iu ne ricevas de mi respondon, la kulpo plej parte estas ne mia. Per ĉiu, eĉ per la plej sensignifa, letero la amikoj de nia afero alportas al mi ne malkontenton, sed nur plezuron, kaj mi respondas ĉiun leteron, kiam mi nur trovas minuton da tempo. Tial mi nun uzas la okazon kaj petas ĉiujn, kiuj skribas al mi leterojn kaj ne ricevas respondon, ke ili ne vidu en ĝi ian malĝentilecon aŭ fierecon de mia flanko, sed ke ili diru al si simple: kredeble li ne ricevis mian leteron aŭ mi ne ricevis lian respondon, kaj tial mi skribu al li ankoraŭ unu fojon. Al mi oni povas skribi leterojn eĉ la plej longajn; tamen se mi mem iam skribas tro mallonge aŭ malfrue, oni volu pardoni al mi, ĉar mia tempo estas tre okupita.

L.L. Zamenhof

(Fonto: Plena Verkaro de L.L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989)



INFORMO PRI MARTINUS INSTITUTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la dana verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento. La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritalaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto.

Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri la Kosmologio de Martinus okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.



Eldonanto: Martinus-Instituto Mariendalsvej 94-96

DK-2000 Kopenhago

Tel: (+45) 3838 0100 Telefotempo: lundo-ĵaŭdo 12-16 DK p.ĝiro 642-9580

www.martinus.dk, esperanto@martinus.dk, shop.martinus.dk

SENPAGA EO-KOSMOS

Senpage, du fojojn jare (en marto kaj oktobro) Eo-Kosmos publikiĝos en elŝutebla formato ĉe la adreso: www.martinus.dk/eo.

Rete kaj retroŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkracitan pdf-dosieron kaj e-pub. Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

Redakcio: Ole Therkelsen. Kompostado: Jonas Dalmose.

Kopirajto: © Martinus Institut. Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.